

Por la angla:

vd. "La angla kaj rusa komparacioj"

Por Esperanto:

Kalocsay & Waringhien, Plena Analiza Gramatiko, UEA, Rotterdam, 1980

Willkommen: Esperanto-Grammatik, Helmut Buske Verlag, Hamburg, 2001

Por la franca:

Blanche: Französische Grammatik Leicht verständlich für jedermann, Buch und Zeit Verlagsgesellschaft mbH, 1967 – *Forst*: Pons Grammatik kurz & bündig Französisch, Ernst Klett Sprachen GmbH, Stuttgart, 2005

Por la germana:

Benzer: „Eine kontrastiv linguistische Darstellung der Adjektive in der türkischen und der deutschen Gegenwartssprache“. Inaugural-Dissertation, Universität Bochum, 2000.

Neubold: Pons Grammatik kurz & bündig Deutsch, Ernst Klett Sprachen GmbH, Stuttgart, 2008

Por la hispana:

Jackson & Rubio: Spanish Made Simple, Made Simple Books, Inc., New York, 1955/1958

Segoviano: Pons Grammatik kurz & bündig Spanisch, Ernst Klett Sprachen GmbH, Stuttgart, 2008

Notoj

(1) La termino "tenco" estas nek en PIV nek en PAG, sed mi jam legis ĝin kaj ne memoras la fonton. "Tenco" miaopinie superas al "tempo" (PAG) pro tio, ke ekz. la kondicionalo, volativo kaj infinitivo striktasence ne havas tempan, sed modan sencion. "Tenco", kvankam etimologie parenca kun "tempo", pli taŭgas por reprezentanti ĉiujn verbajn funkciojn.

(2) La francaj "gros" kaj "épais" signifas "dika": la unua en la senco de "fortikeco", la dua en la senco de "pezeco kaj la sekva limigo de movkapablo".

(daŭrigota)

Adreso de la aŭtoro

Gerald TUCKER

Breitenbergstrasse 7

DE – 86163 Augsburg / GERMANIO

<g.tucker@gmx.de>

Priaŭtora informo

Gepatra lingvo: uson-angla. Unua fremdlingva kontakto: hispana. Formala lingvolernado: la francan kaj germanan en lernejo, la rusan en la armeo (intensa kurso), la turkan en universitato. Aŭtodidakte: Esperanton, lingvistikon. En 1970 la aŭtoro tradukis en Esperanton la libron "La besto-farmo" de *Orwell*, kaj ekde 1972 li estas fakestro por ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto.

*Recenzo***Cetere, vivu la viziuloj! Honoron al ili!**

Recenzo pri

"Ĉu kultura integriĝo en Eŭropo?"

Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturoj"

Jiri LAUBE

Dobřichovice: KAVA-PECH, 2007, 31 p., 20 cm.

ISBN 9788085853964. € 2,10

Jen teksto de vera humanisto. La respondoj de *Laube* al la aktuala problemo de kultura Eŭropa integriĝo baziĝas sur kultur-historiaj, precipe religiaj konsideroj, en konkordo kun la opinio de *Madeleine Albright*, ke "la ŝanĝo, kiun oni aktuale registras, estas nova kresko de influo de la religio" (p. 8). Mi persone dubas, ĉu tia aserto kaptas la ĉefan faktoron de la niatempaj eventoj. Pli verŝajne rolas neniam antaŭe konata decidkapablo de ekonomiaj kaj politikaj interesoj de hegemoniistoj.

Per klaraj, mallongaj frazoj, sintezoj de konoj kaj propraj pensoj, *Laube* argumentas la neceson kaj eblecon de paca kunvivado de la nuntempaj kulturoj (judismo, islamismo, kristanismo). La harmonia kunekzistado estas ebla ne nur pro raciaj kialoj, sed ankaŭ danke al malnovaj, komunaj radikoj; bedaŭrinde, montras la aŭtoro, la reciproka ignorado dum la historio damaĝis ĉiujn. *Laube* konscias, ke la "troa materia kaptiteco de la homo kaj de la socio" estis longtempe negativa faktoro por la kunvivado de popoloj kaj kulturoj, sed nune, optimisme, li opinias ke, bonŝance, tiu faktoro "atingis sian kulminon" kaj nun "jam aŭguriĝas nova, sanoplana kaj ekvilibra vivo, kie la spirito gvidas la aktivadojn de la socio".

Ankaŭ ĉi-rilate mi estas multe pli skeptika. *Laube* prave kredas je la forto de la racio, tial li trovas historiajn kaj praktikajn argumentojn por demokratia simbiozo de la nunaj Eŭropaj kulturoj. Unu tia argumento baziĝas sur interesa paralelo: kaj la judismo kaj la islamismo

havas unu malnovan lingvon kaj unu ĉiutagan. Per Esperanto, ankaŭ Eŭropo povus krei similan du-tavolan lingvan situacion. Li mencias la argumentojn por Esperanto kaj por ties rolo (p. 17-18) en la konservado de la hodiaŭaj naciaj kulturaj specifaĵoj (p. 25-27); lia opinio tion pravigas ankaŭ “tute novaj principoj” de la hodiaŭa Eŭropo (p. 28). La ekzemplo de la juda historio atestas ja la plurflankajn avantaĝojn, kiujn povus doni al la apartaj popoloj kaj al la tuta homaro la interna ligilo (ekz. religia) de ĉiu etnio.

La broŝuro de *Laube* aldoniĝas al la hodiaŭaj streboj solvi la internaciajn problemojn per raciaj, humanismaj ideoj. Restas la demando, ĉu la nuntempaj evoluoj troviĝas, vere, antaŭ la *teoria problemo kiel integri la kulturojn*, aŭ ĉu la hegemoniaj potencaj faktoroj trudas siajn kulturajn al la cetera mondo. Tamen tiuj faktoroj ne estas ĉiopovaj. Kontraŭ la fia fenomeno devas daŭre agadi la spirita fortoj de la konscia homaro kaj la inside minacataj ŝtatoj: tio estas firma konvinko de la esperantistoj.

Dum mi legis la interesan verketon, venis al mi du t.n. ektosemantikaj ideoj (do, ideoj kiujn la aŭtoroj ne rekte komunikas, sed la leganto “vidas kaj legas ilin tra la vicoj” konkludante ion nediritan fare de la aŭtoro):

1. Videblas denove la grava rolo de la personecoj kaj ties validaj ideoj en la historio. *Laube* prezentis la pasiajn agadojn de *Eliezer Perlmann* (kiu revis renovigi kaj modernigi la malnovan hebrean lingvon), de *Theodor Herzl* (fondinto de la juda ŝtato) kaj ankaŭ la ideojn de *Zamenhof*, iliajn engaĝiĝojn ŝanĝi historiajn situaciojn, unue la destinton de la hebrea popolo, tiom suferinta, kaj, respektive, likvidi la obstaklojn de la interpopola kompreniĝo.

Laube memorigas, ke la forto de la ideo efikis ankaŭ, en la sepa jarcento, por la araboj, kiam Mohamedo taskis al si rebonigi la difektitajn morojn de sia popolo. La ne-bigotaj kristanoj aldonus ankaŭ la rolon de la saĝulo Jesuo, kiun ni devas vidi senigita de la teologiaj legendoj, forrabantaj de li la **homecon**: per sia ĉefa ideo “ŝanĝu vian pensadon” kaj per siaj faroj li venkis la Romian imperion. Kompreneble ĉiuj tiaj epokfaraj personecoj agadis kune kun fidelaj kunlaborantoj, multiplikantoj de la gravaj pensoj kaj tiele la miljaraj neebloj realiĝis.

Do, “vivu la viziuloj! Honoron al ili!” povas diri la esperantistaj legantoj.

2. Inter la grandaj pensuloj de nia epoko, al kies ideoj *Laube* rilatas, troviĝas, unuavice, la usona lingvisto *Chomsky*. La leganto de la broŝuro, informita pri la pacaj, demokratiaj, kontraŭhegemoniaj konceptoj de *Chomsky*, konscias, ke la negativa opinio de tiu lingvisto pri Esperanto montras nur, ke li spertas la kutiman situacion de multaj sciencistoj, al kiuj la problemaro de la Internacia Lingvo fakte ne estas konata. Ni konsciu ke, intuicie, sen aparta informado, la plurflanka signifo de la internacilingva ideo apenaŭ estas perceptebla, kaj se tamen jes, la perceptado estas precipe afekcia kaj supraĵa. *Umberto Eco*, post kompreno de tiu ĉi ideo, ŝanĝis sian antaŭan negativan opinion pri Esperanto. Mi aldonas la ekzemplon de la lingvisto akademiano *A. Graur*, kiu, aparteninta al la hebrea minoritato de Rumanio, bone konis la kulturajn – inkluzive lingvaj – problemojn de la hebrea ŝtato, sed estis firme konvinkita, ke la modernigita lingvo de la hebreoj “ne funkcios”. Lia opinio ankaŭ Esperanto, same “artefarita lingvo”, ne funkcios.

En 1978, kiam en Rumanio estiĝis la “Akademia Kolektivo pri Esperanto”, mi montris al *Graur* grandajn Esperanto-vortarojn, kelkajn librojn kaj revuojn, kun la aserto: “Kamarado profesoro, jen kaj Esperanto kaj la modernigita lingvo de la hebreoj funkcias”. Li nur ridetis kaj diris: “Mi ne malpermesis al miaj kunlaborantoj okupiĝi pri Esperanto”. Baldaŭ profesorino *Lucia Wald*, profesoro *Constantin Dominte* kaj docentino *Iona Prioteasa*, kunlaborantoj de *Graur* al verkado de lingvistikaj traktaĵoj, malfavoraj al “artefaritaj lingvoj”, fariĝis aktivaj anoj de nia “Kolektivo Esperanto kaj Interlingvistiko”.

Mia opinio, ankaŭ *Chomsky* estus kompreninta la sencon kaj la valoron de Esperanto, sed, verŝajne, oni ne estis prezentinta al li la problemaron de la Internacia Lingvo. Kuŝas ĉi tie por ni strategia konkludo: Ni atente, bone preparite, kontaktu *ne ĉiun ajn* scienciston, sed tiajn, kiuj estas konataj kiel apertaj al novaj, demokratiaj ideoj. *Chomsky* estas ja unu el tiaj sciencistoj.

Prof. Ignat F. BOCIORT
Wustrower Str. 1

DE – 13051 – Berlin / Germanio

Redakcia noto: *Jiří Laube* (1923-2009) forpasis la 18-an de septembro en *Roudnice nad Labem* / Ĉeĥio, kie li estis delegito de UEA. Post 6 jaroj en malliberejo (1954-1960) pro politikaj kialoj, li, vivtenante sin kiel helplaboristo, aktivis por Esperanto kiel instruanto kaj funkciulo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kies honora membro li estis.

Tiu ĉi recenzo de lia libro “Ĉu kultura integriĝo en Eŭropo?” estas samtempe omaĝa nekrologo al plenkora esperantisto kaj iama landa delegito de ISAE.